

18.6.2006



Vekiĝu ho dormantoj

Vekiĝu, ho, dormantoj, jam vokas la kukol' 2x
Vekiĝu, vekigu, jam vokas la kukol'
Kuku, kuku, kuku, kuku.

De norda neĝo region

De norda neĝo region
ĝis varma suda sabloland'
/:niaj salutoj flugu ventrapide,
tondre nun sonu nia ĝoja kant'!/:

Per mola paŝo venas

Per mola paŝo venas
la nokto trans montara pont',
la dormo zorgojn prenas,
nin gvidas al sonĝ-rava mont'.

Alaŭdeto

Alaŭdeto, juna alaŭdeto, mi alaŭdo senplumigos vin.
Sen plum' estos via kap', sen plum' estos via kap'.
1. Kaj la kol', kaj la kol', ó, ó, ó, ó
2. Kaj la trunk', kaj la kol'
3. Kaj la vost', kaj la trunk', kaj la kol', ó, ó, ó, ó
4. Kaj flugil', kaj la kol', ó, ó, ó, ó
5. Kaj pied', kaj la kol', ó, ó, ó, ó
6. Kaj okul' kaj la kol', ó, ó, ó, ó
7. Kaj la bek' kaj la kol', ó, ó, ó, ó
8. Kaj la brust' kaj la kol', ó, ó, ó, ó

Frat' Jakobo

Frat' Jakobo, frat' Jakobo,
ĉu en dorm, ĉu en dorm?
Iru sonorigu, iru sonorigu,
bim, bam, bom, bim, bam, bom.

Saĝulo

Saĝulo konstruis domon sur la rok' 3x
Poste venis granda pluv'.
Pluvegis kaj akvo levis sin, 3x
sed la domo ne falis.

Sur sablo konstruis domon frenezul' 3x
Poste venis granda pluv'.
Pluvegis kaj akvo levis sin, 3x
kaj la domon forportis.

Suno sin kaŝis

Suno sin kaŝis sur firmamento,
birdoj ne pepas, dormas la land'.
Sidas ni kune, nokta silento,
kanto eksonu kaj ludu band'.
Tien kaj reen ni balanciĝas,
tien kaj reen, jen la balanc'.
Supren – malsupren ni balanciĝas,
supren – malsupren, jen la balanc'.
Dekstren – maldekstren ni balanciĝas,
dekstren – maldekstren, jen la balanc'.
Je ĉiuj flankoj ni balanciĝas,
je ĉiuj flankoj, jen la balanc'.

Vesperbrilo

Ĉarma estas vesperbrilo, vesperbrilo,
se eksonas sonorilo, sonorilo.
Bim – bam, bim – bam, bim – bam.

Vivu la stel'

Plenigu la glason, ho, ĉiu bonul'.
Vivu la verda stel'!
Kaj kantu la homoj el ĉiu angul'.
Vivu la verda stel'!

Ref.: Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel'
Vivu la, vivu la, vivu la stel'
Vivu la stel', vivu la stel'
vivu la verda stel'!

Plenigu la glason jak tostu kun ni.
Vivu la verda stel'!
La lingvon kreitan por ĉiu naci'.
Vivu la verda stel'!

Ref.:

Per voĉoj de nia kunbatalantar'.
Vivu la verda stel'!
Resonu la voko sur tero kaj mar'.
Vivu la verda stel'!

Ref.:

Mariŝa

Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amas sin,
nur neniu junuleto amas min. 2x

Ref.: /:Mariŝa kisu min, seb peto al patrín',
ŝi juna same faris, pri kisoj ne avaris.:/

Batas panjo, batas panjo, batas min,
ke mi amas, ke mi kisas knabo vin. 2x

Ref.:

Sidas panjo, sidas panjo sur kortet, kaj mi estas en
kamero kun knabet'. 2x

Ref.:

Nin portis plu kaj plu

Nin portis plu kaj plu rivera ondo,
nin ĉirkaŭprenis arbara mondo.
/:Nin portis plu kaj plu rivera flu'!/:

Remiloj kaj ŝipet' nur estas etaj,
ĉu por reveno ni estas pretaj.
/:Nin portis plu kaj plu rivera flu'!/:

Nin portis plu kaj plu ondet' petola,
sub kiu ludas fiŝet' ne sola.
/:Nin portis plu kaj plu rivera flu'!/:

